SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio «Languedoc - Roussillon»

72, Avenue Général de Gaulle - 66000 PERPIGNAN (Pyrénées-Orientales)

JARA ABONO : 5 F. C. C. P. 956-28 Montpellier

4-a Kvaronjaro 1975 N° 57

# Rezolucio de la Komitato de Universala Esperanto Asocio

La komitato de UEA en siaj kunsidoj en Kopenhago dum la 60a Universala Kongreso de Esperanto de la 26a de julio ĝis la 2a de aŭgusto 1975

KONSTATIS

ke lastatempe aperis en pluraj naciaj ĵurnaloj artikoloj en kiuj oni kontestas la politikan neŭtralecon de Universala Esperanto-Asocio,

DEKLARAS

ke al tiuj diskonigoj kaj gravaj akuzoj mankas ĉia bazo de vero kaj ke ne ekzistas unu sola pruvo kiu pravigas tiajn misprezentojn,
ke la politika neŭtraleco de UEA, kiel ĝi estas priskribita en la artikoloj 4 kaj 13 de ĝia statuto, ĉiam estis kaj ĉiam restos la fundamento gvidprincipo de ĝia tutmonda agado kaj daŭre konsistigas la neŝanceleblan bazon de ĝia ekzistado,

ke la Asocio estas preta kunlabori kun ĉiuj fortoj strebantaj al unueca komuna celo.

REKOMENDAS

ke la estraro kaj la redaktoro de la revuo "Esperanto" evitu diskutojn pri la longe diskutitaj faktoj kaj pri la personecoj de nunaj aŭ antaŭaj gvidantoj en la Movado,

PETAS

ke tiu ĉi deklaro estu vastskale diskonigata per ĉiuj taŭgaj rimedoj de informado.

(el "Esperanto n° 837 (9) - septembro 1975)

-------------

## *AUTUNA KUNVENO DE LA FEDERACIA KOMITATO*

Ĝi okazis en Narbonne dimanĉon la 5-an de oktobro.

Ni devas tre danki gesinjorojn DELIGNE pro la kutime bona aranĝo.

Matene ni kunsidis ĉe la junulargastejo kaj iom antaŭ tagmeze, aŭtomobile, ni iris al kastelo Lebrete, je 6 km. for de Narbonne. Tie atendis nin tre agrabla surprizo. La kastelo, ekstere kaj interne, estas ege bela kaj la tie servita delikata bankedo (ĉi vorton oni povas uzi sen ia troigo) kontraŭ vere tre modesta prezo lasis al ĉiu neforgeseblan impreson. Do materie estis tre agrabla kaj sukcesa tago kiun ni ŝuldas al niaj geamikoj DELIGNE.

Ĉeestis dek el la dekdu federaciaj estraranoj kaj komitatanoj al kiuj aldoniĝis dekkvino da gesamideanoj.

Post enkondukaj voĉoj de Sro LLECH-WALTER ni kore bonvenigis Sron François CANONNE el Valenciennes nun definitive loĝanta en Elne. Espereble li aktive partoprenos la vivon de nia federacio.

Antaŭ ol debati pri la tagordo Sro AMOUROUX estis konfirmata kiel federacia sekretario.

La financa situacio de la federacio estas sufiĉe kontentiga. La eksplikoj de Sro DELIGNE troviĝas en ĉi numero.

An kaŭ la financa situacio de "Sudfrancia Stelo" estas ekvilibrata kaj sekve, estis decidite, ke ĝi daŭre aperos kiel antaŭe. Niaj amikoj FRUS kaj Dro SALAN penas por ke nia federacia ligilo aperu regule, kun variaj rubrikoj kaj bele presita.

Sro DELIGNE, federacia kasisto, legis la tarifojn de la novaj kotizoj por UFE kaj UEA. Ili ankaŭ troviĝas ĉi-aldone. Notinde estas, ke la kotizoj de UEA ne ŝanĝiĝis kaj ke UFE konservis du bazajn kotizojn. La "simbola" fariĝis 15,00 franka anstataŭ 9 F-a. Ĝi devus esti nur por "simpatiantoj". La devkonsciaj esperantistoj devus pagi la kotizon kiu inklŭzivas la abonon al "Franca Esperantisto". Ĝi fariĝis 66,00 franka anstataŭ 60,00 franka. La plialtigo je 10% iel kompensas la perditan valoron de la mono dum la pasinta jaro. Kiel mi plurfoje diris kaj ripetis nia nacia asocio, UFE, ne estas subvenciita. Do nepre necesas, ke la esperantistoj membriĝu... ne kiel simpatiantoj. Necesas ankaŭ ke la kotizperantoj enkasu la kotizojn plej baldaŭ kiel eble kaj senprokraste ilin transsendu al la federacia kasisto. La monon ili ĝiru al la CCP MONTPELLIER 956-28 : "Fédération d'Espéranto Languedoc-Roussillon" kaj detalojn kun nomoj kaj adresoj ili sendu al Sro Maurice DELIGNE 3 C, rue Paul Ramadier - 11100 Narbonne.

El diskuto pri la leĝopropone celanta inkluzivi Esperanton kiel nedevigan helpan lingvon en la duagradajn lernejojn ŝajnas ke, kvankam nerapide, la afero favore progresas. La interveno de unuopuloj ĉe parlamentanoj en nia regiono ĝenerale ricevis favoran eĥon.

D-ino VIERNE kaj D-ro SALAN, partoprenintaj la 60-an Universalan Kongreson de Esperanto en Kopenhago, raportis pri siaj kongresaj impresoj. Jam en la antaŭa numero de "Sudfrancia Stelo" D-ro SALAN skribis sian favoran opinion pri la nova prezidanto de UEA.

Tie situas la tagmeza paŭzo kaj nur je la 15a en belega salono de la kastelo Lebrete rekomenciĝis la kunsido dum tri lernintoj de S-ro DELIGNE brile trapasis la unuagradan ekzamenon. Gratulojn al la kandidatoj kaj instruinto.


S-ro AMOUROUX reeĥis interesajn atingojn de la IKUE-kongreso okazinta en Romo.

D-ino VIERNE raportis pri la preparoj de la venontjara franca E-kongreso okazonta en La Grande Motte. Espereble multaj niaj federacianoj ĝin partoprenos.

D-ino VIERNE diris ankaŭ, ke en julio 1976 okazos en Montpellier la jarkongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI). Ĉiuj esperantistoj, eĉ se ne kristanoj, estos kore bonvenaj.

Estis decidite, ke ĉiuj grupgvidantoj de la federacio, ankaŭ unuopuloj, skribu ĉirkaŭ la 20-an de novembro al la regiona televidstaciestro (adreso: journal parlé et télévisé - La Colline - 34000 MONTPELLIER) petante, ke okaze de la ZAMENHOF-tago (ĉu la 15a de décembro, ĉu alia antaŭa aŭ posta tago laŭ la televida programo) estu intervjuata Dro SALAN (adreso: 19, rue Pradier - 30000 NIMES) pri Esperanto kaj ZAMENHOF. Estus bona reklamo. DO necesas, ke ni skribu.

Nia venonta federacia kongreso okazos en BEZIERS dimanĉon la 14-an de marto 1976. Ĉar dume verŝajne ne aperos nova numero de "Sudfrancia Stelo" necesas, ke ĉiu notu la koncernan daton kaj ĝin rezervu por nia ĉiujara federacia renkontiĝo. Per cirkulero la grupgvidantoj ricevos informojn ĝustatempe.
(protokolis Jean AMOUROUX).




# Financa federacia situacio depost la Kongreso en Lunel

**5 an de oktobro 1975**

---

Kiel kutime mi prezentas al vi hodiaŭ nian nunan financan situacion.

Pasintjare, je la sama epoko, nia tuta havaĵo konsistis je 1.181,27.

Hodiaŭ ni havas:

| | |
|---|---|
| en la poŝtakonto | 415,32 |
| en la ŝparkaso | 629,00 |
| en la kaseto | 311,65 |
| En-tute.. | 1.355,97 |

sed ĝis la fino de la jaro mi devos pagi tri numerojn de SFS, tio estas 450,00 fr. Mi ne ankoraŭ ricevis la fakturon de la n° 55a.

Tiu sumo je 1.355,97 konsistas el nia antaŭ-havaĵo, okaze de la kongreso en Lunel, kaj el la profitoj de la kvarkoloraj afiŝetoj de nia amiko RAYNAUD, kaj de la zamenhofaj poŝtkartoj de nia amiko AMOUROUX.

La kvarkoloraj afiŝetoj donis profiton je 242,85, kaj la zamenhofaj poŝtkartoj profiton je 140,50. Pasante mi memorigas vin, ke en Lunel S-ro LLEH-WALTER pagis 400,00 por la presado de tiuj poŝtkartoj, sumo kiu estis repagita al li la 5an de junio. Do, ambaŭ aferoj estas sufiĉe bonaj.

---

Mi ricevis la tarifojn de la kotizoj por UFE kaj UEA, por la jaro 1976 kaj jen ili:

Kotizoj UFE

| | |
|---|---|
| La 9 franka kotizo ... fariĝas | 15 franka |
| 60 franka | 66 franka |
| 83 franka | 92 franka |
| 128 franka | 140 franka |
| 1.200 franka | 1.320 franka |
| 1.660 franka | 1.840 franka |
| 2.560 franka | 2.800 franka |

La kotizoj des UEA ne ŝanĝiĝis.

Sed, kaj tio estas bona por la Federacio, la:

| | | |
|---|---|---|
| 15 franka kotizo lasos al ni | 2 frankojn anstataŭ | 1 |
| 66 franka | 6 | 5 |
| 92 franka | 9 | 8 |
| 140 franka | 14 | 13 |
| 1.320 franka | 120 | 100 |
| 1.840 franka | 180 | 160 |
| 2.800 franka | 300 | 260 |

Do mi faris la jenan kalkulon:

se ĉiuj niaj membroj kiuj pagis pasintjare naŭfrankajn aŭ sesdekfrankajn kotizojn, konsentos pagi la saman tipon de kotizo, nia federacia parto de la kotizoj en 1976 konsistos el 248,00 anstataŭ 180 en 1975.

Mi esperas, ke por niaj membroj, tiu perspektiva igos la pilolon malpli amara.

Kiel kutime, mi estas je via dispono por respondi al viaj demandoj ĉu buŝe, ĉu skribe.

## JEN LA NOVAJ TARIFOJ DE LA KOTIZOJ POR 1976a

Por ĝisdatigi mian sliparon kaj eviti al mi erarojn, vi bonvolos laŭeble indiki sur viaj venontaj listoj de membroj:

1 - la personojn kiuj estis aŭ estas ankoraŭ instruistoj.
Tiuj personoj, plenrajte, estas membroj de G.E.E., kaj mi devas indiki tion sur la kotizfolioj kiujn mi sendas al UFE.

2 - la naskiĝdaton de viaj membroj malpli ol dudekjaraj kiuj pagos ĉu 15, ĉu 46 frankojn, kiuj estas membroj de JEFO.

Kaj nun jen la kotizoj:

### U . F . E .

| | |
|---|---|
| Membre adhérent | 15 |
| Membre titulaire (moins de 22 ans) | 46 |
| Membre titulaire (plus de 22 ans) | 66 |
| Membre donateur | 92 |
| Membre bienfaiteur | 140 |

Cotisation unique

| | |
|---|---|
| Membre titulaire à vie | 1.320 |
| Membre donateur à vie | 1.840 |
| Membre bienfaiteur | 2.800 |

### U . E . A .

| | |
|---|---|
| Membres de moins de 22 ans avec Jarlibro | 22 |
| - d° - avec Jarlibro + Espéranto + Kontakto | 66 |
| Membres de 22 à 25 ans avec Jarlibro | 44 |
| - d° - avec Jarlibro + Esperanto + Kontakto | 88 |
| Membres de plus de 25 ans avec Jarlibro | 44 |
| - d° - avec Jarlibro + Esperanto | 88 |
| Cotisation de soutien | 264 |
| Cotisation de soutien à vie | 1.760 |
| Abonnement seul à Esperanto | 66 |
| Patrono "A" de TEJO (kun Kontakto) | 46 |
| Patrono "B" de TEJO (ricevas aliajn materialojn) | 16 |


Bonvolu la plej eble grupi viajn kotizojn kaj vi povos sendi ekde la komenco de decembro.

Maurice DELIGNE.

# KRUCVORTOJ

## Horizontale *

1 – Franca urbo
8 – Senŝanĝe
9 – Nigeria lingvo
11 – Kiel serpenton, ekzemple
13 – Nokta bird'
15 – Lernantar'
16 – Fluge
18 – Ŝur ĝi oni martelas (R)
19 – Diru ĝin denove
21 – Grup'
22 – Ekzemple nominativo
25 – Ĉefurbo



Geoffrey King (Anglio) 1975

## Vertikale *

1+24 – Suferigi pro kulpo
1 – Winnie-la-.....
2 – Sinsekvaj literoj
3 – Ĉefurbo
4 – Fantazi
5 – Valorŝton'
6 – Regant'aktiva
7 – Franca urbo
10 – komencu atleti
12 – Popol'
13 – Insekt'
14 – Grat'
16 – Distre-pekete
17 – Ĉefurb'
18 – Agricevantoj (R)
20 – komencu!
23 – Intencas
24 – La gravuloj (v. aŭkaŭ 1 vert.)

La centpiedul' promenis gaja
ĝis demandis muŝo maja
kiel marŝi ĝi sukcesas.
"Nu, vi vidas". Muŝo jesas,
sed insistas pri l'metod
kaj per malkler' de l'centipod'
tiel povis ĝin konfuzi
pri l'manier' la piedojn uzi,
ke ne sciis ĝi sin movi,
kuŝis la rampul' sen povi
kaj jam igis ĉiujn miri
dubante kiamaniere iri.

Parafrazo
laŭ angla anonimaĵo
el la 19-a jarcento

(R. Raynaud)

— Kiam mi estis juna, oni diris al mi : « Atendu ĝis kiam vi estos maljuna ; vi vidos ». Kaj nun mi estas maljuna : nu, mi nenion vidis.


Mi naskiĝis tre juna ; en Mondo tre maljuna, (Erik Satie, Francmuzikisto)

* (R) – Nur radiko
* Solvo de la antaŭa problemo


Solvo de la krucvortoj aperinta sur la N° 56

| | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| A | M | P | L | I | F | I | ■ | I | ■ | E | L |
| M | A | R | A | B | U | O | ■ | L | A | R | O |
| P | L | U | G | I | L | ■ | S | ■ | L | O | K |
| L | A | D | ■ | S | A | T | E | L | I | T | O |
| E | G | ■ | L | O | K | E | N | O | ■ | I | M |
| K | R | I | I | ■ | D | R | E | L | I | K | O |
| S | A | L | T | I | ■ | O | L | ■ | D | A | T |
| A | B | O | R | T | I | ■ | I | R | I | ■ | I |
| ■ | L | ■ | O | ■ | B | A | R | E | L | ■ | V |
| F | E | A | ■ | P | I | P | E | L | I | N | O |
| A | ■ | B | R | O | S | O | J | ■ | O | I | ■ |
| M | O | N | O | L | O | G | O | J | ■ | A | L |


# 5 minutoj da intervalo




*Ne estu idioto, filo. . . .*



*Pere de tiu seksomanio, mi timas baldaŭ resti senlabora.*




*Nur unu fingro, dankon. . . .*



*Estas unu el pluvegaj lokoj el nia regiono.*



*ANGORULO - Kaj poste, se ĝi disvolviĝos ?*



*VIDPUNKTOJ - Vere mi preferus hundidon.*

R. Frug




# FILATELA ANGULO

*Anoncetoj*

D-ino VIERNE sciigis, ke okaze de la 68-a franca Esperanto-Kongreso en La Grande Motte la kongreskomitato petis de la poŝtadministracio la uzon de:

1 - meĥanika poŝtvarbstampo, ne ilustrita, anoncanta, en la franca lingvo, la okazontan kongreson. Dum tri monatoj antaŭ la kongreso ĝi estos uzata de iu poŝtoficejo de Montpellier.

2 - memoriga poŝtstampo uzota dum la kongreso en la Grande Motte.

La kongreskomitato ankaŭ intencas presigi porokazajn kovertojn kun la emblemo de la kongreso.

# VIVO DE LA GRUPOJ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

Mi kolektas ĉiuspecajn malfreŝdatajn esperantaĵojn: librojn, broŝurojn, revuojn, bultenojn, poŝtkartojn, fotojn, manuskriptojn, filatelaĵojn, jarlibrojn, kongresan materialon (UEA, SAT, fervojistoj, naciaj, regionaj, fakaj kongresoj): librojn, kartojn, insignojn, fotojn, invitilojn, ktp... ktp...

Ju pli malfreŝdata estas la materialo des pli interesa ĝi estas por mi.

Mi repagas laŭdezire inkluzive de la sendkostoj.

Jean AMOUROUX - 1, rue de Sorède - 66000 PERPIGNAN.

## PLENSUKCESAJ PRELEGOJ EN KOLEGIO EN ELNE (Orientaj Pireneoj) Francio.

80 gelernantoj de la kolegio en Elne ĉeestis la prelegojn de S-ro René LLECH-WALTER, Honora Prezidanto de UFE, delegito de UEA, la 17-an kaj 24-an de oktobro 1975.
Kaptante la okazon ke S-ro CANONNE, prezidinto de la grupo de Valenciennes (Nord-Francio), emerito, nun loĝas en Elne, S-ro LLECH-WALTER anoncis malfermon de esperanto-kurso la 7-an de novembro en la kolegio de Elne. Tuj 40 gelernantoj enskribiĝis.
Por la plenkreskuloj loĝantaj en Elne oni antaŭvidas publikan prelegon kaj kursojn.
Bonega agado en la kadro de la Federacio 'Langvedoko-Rusiljono", kies prezidanto estas la delegito de U.E.A en Perpignan.

## DEPARTAMENTA FEDERACIO " GARD "

Kotizo 1976 ........................... 2 fr.
Abono al "Sudfrancia Stelo" ........ 5 fr.

La izolitaj gesamideanoj bonvolu pagi al:

Fédération départementale du Gard
pour l'Espéranto
C.C.P. Montpellier 1 857 07

LA ĜENERAL-JARKUNVENO OKAZOS DIMANĈON LA 25-an DE JANUARO JE LA 9-a kaj 1/2 en ALES (Centre Culturel Communal, 2, Place H. Barbusse).




# Atentu !

La verko de nia samideano, D-ro Georges Salan, el Nimeso, "La Nuda Vero" (Originala raporto pri naziaj koncentrejoj dum la lasta mondmilito), el kiu ni jam publikigis plurajn eltiraîojn, aperos fine de novembro. Vi povas jam antaùmendi la libron rekte al la aùtoro : 19, rue Pradier - 30000 Nimes (F) PĈK : 8572 Montpellier.

Rabata prezo por kiuj mendos antaù la 1-a de Januaro 1976 : 25 F., kun afranko 30 F.

---



*Okaze de Kristnasko kaj Novjaro ni esprimas niajn sincerajn bondezirojn al ĉiuj niaj legantoj kaj simpatiantoj.*

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

**Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES**

Dépot Légal : 4me Trimestre 1975

Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes

*UNION FRANÇAISE POUR L'ESPERANTO*
*4-bis rue de la Cerisaie - 75004 PARIS*

**68ª NACIA KONGRESO DE ESPERANTO**

**LA GRANDE-MOTTE (Hérault)**

**PASKO 1976 ★ 17-20 APRILO**

# ALIĜILO

Familia nomo ; .................................................... Persona nomo ; ....................................................

Naskiĝdato ; .................................................... Kompleta adreso (kun poŝta kodo) ....................................................

..........................................................................................................................................

Faka(j) Asocio(j) ; ..........................................................................................................................

Dato : .................................................... Subskribo ; ....................................................

# KOTIZOJ

| | | |
|---|---|---|
| Kongresan(in)o . . . . . . . . . . . . . . | 45 F. ĝis la 31 I '76 - | 50 F. ĝis la 15-a de marto. |
| Geedzoj . . . . . . . . . . . . . . | 60 F. " | 60 F. " |
| Studentoj kaj gejunuloj sub 22 j. . . . . . | 15 F. " | 20 F. " |
| Eksterlandanoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . | | SENPAGE |

Bonvolu sendi la Aliĝilon al ; S-ino NEGRON 22, Chemin du Mas-Blanc - 34400 LUNEL kaj la pagon al ; G.E.M. 68• Kongrés d'ESPERANTO C.C.P. 2142.19 Montpellier alie ne valoros vian mendon.